# der esperantist

**Mitteilungsblatt der Esperantofreunde der DDR im Deutschen Kulturbund**

4. Jahrgang Nr. 24 August 1968 30 Pfennig

## KARL MARX

### 1818—1968

### fondinto de la scienca socialismo

**Fr. Engels**

# KARL MARX

(Parolo ĉe la tombo de Karl Marx)

La 14-an de Marto je tri kvaronoj post la dua posttagmeze ĉesis pensi la plej granda pensulo de l'moderna epoko. Du minutojn post tiam, kiam ni forlasis lin, ni trovis lin trankvile ekdorminta por ĉiam en lia fotelo.

Ni ne povas elmezuri ĉion, kion perdis en lia persono la batalanta eŭropa kaj amerika proletaro kaj la historia scienco. Tre rapide eksentiĝos la manko, kiun alportis la morto de ĉi-giganto.

Simile al tio, kiel Darwin malkovris la leĝon pri evoluo de l'organika naturo, Marx malkovris la evoluleĝon de l'homa historio: li malkovris la simplan fakton, ĝis tiam kaŝitan sub la kovraĵo de l'ideologiaj rezonadoj, ke la homoj antaŭ ĉio devas manĝi, trinki, vivi kaj vestiĝi, kaj nur post tio zorgi pri politiko, arto, religio, ktp., ke tial la produktado de senperaj materialaj vivrimedoj kaj respektiva grado de ekonomia evoluo de l'popolo aŭ temp-periodo, estas la bazoj, sur kiuj disvolviĝas la regnaj institucioj, juraj opinioj, arto kaj eĉ religiaj imagoj de l'respektivaj uloj; kaj en tiuj — ili trovas sian klarigon, sed ne male, kiel oni opiniis ĝis nun.

Sed per tio ne ĉio estas dirita. Marx malkovris ankaŭ la specialan movan leĝon de l'moderna kapitalista maniero de produktado kaj de l'burĝa socio, kreita de ĝi. Kun la diskovro de l'supervaloro, tuj lumiĝis tiu regiono, kiu dum ĉiuj antaŭaj esploroj de l'burĝaj ekonomiistoj, same de l'socialistaj kritikuloj, vagis en mallumo.

Du tiaj malkovroj sufiĉas jam por tuta vivo. Feliĉa estas tiu, kiu sukcesas fari almenaŭ unu tian malkovron. Sed en ĉiu aparta fako, kiun Marx subigis al sia esploro, — kaj da tiaj fakoj estas tre multaj, kaj en neniu Marx estis supraĵema —, en ĉiu fako, eĉ en matematiko, li faris memstarajn malkovrojn.

Tia estis Marx, kiel homo de scienco. Sed tio ne konsistigas eĉ la duonon de lia laboro. La scienco estis por Marx histori-moviga, revolucia faktoro. Li ĝuis puran ĝojon pro ĉiu nova malkovro en regiono de teoria scienco, kies praktika utileco estis eble ne jam klara. Sed li ĝuis ankoraŭ pli grandan ĝojon pro tiaj malkovroj, kiuj okazigis senprokrastan revoluciigan

efikon en industrio kaj ĝenerale en historia evoluo. Tiel, li atente observis la malkovrojn en elektrofako, interalie, la eksperimentojn de Marc Deprez.

Sed antaŭ ĉio Marx estis revoluciulo. Lia vera viv-inklino estis la kunhelpo al la renverso de l'kapitalista socio kaj de l'kreitaj de ĝi regnaj institucioj, helpo al la emancipo de l'moderna proletaro, al kiu li je l'unua fojo sugestis la konscion pri la kondiĉoj, necesaj por ĝia liberiĝo. La batalo estis lia elemento. Li luktis kun tia pasio, tia obstino kaj tia sukceso, kiel malmultaj. La unua „Rejna Gazeto" 1842, pariza „Vorwärts" 1844, Bruxel-les 's „Germana Gazeto" 1847, New-York's „Tribuno" 1852—1861 kaj, krom tio, multego da polemikaj broŝuroj, la laboro en pariz'aj, bruxelles'aj kaj london'aj asocioj, kronita per la fondo de l'granda Internacia Laborista Asocio — jen la resumo de tiu laboro, pri kiu povus plenrajte fieri ĝia farinto, eĉ se li ne estus farinta ion alian.

Kaj nome pro tio Marx estis malamita pli, ol iu alia. Superŝutante lin per ĉia kalumnio, la monarkiaj kaj respublikaj registaroj multfoje ekzilis lin; la konservemaj kaj ekstremdemokrataj burĝoj, ne cedante unuj al aliaj mensogis kaj prikalumniis lin. Li forĵetis de si ĉion, kiel araneaĵon, malatentis tute la kalumniojn kaj respondis al la atakoj nur en okazoj de ekstrema neceseco. Li mortis, akirinte al si la estimon, amon kaj konfidon de milionoj de siaj revoluciaj kunlaboruloj, dislokitaj tra la tuta Eŭropo kaj Ameriko, de l'Siberiaj minejoj ĝis Kalifornio, kaj mi povas kuraĝe diri: li havis multajn kontraŭulojn, sed dubinde, ĉu almenaŭ unu personan malamikon.

Lia nomo postvivos centjarojn, ilin postvivos ankaŭ lia verko.

---

„. . . Se vi deziras kompreni la historion, ne haltu ĉe la supraĵo de l'fenomenoj, sed rigardu pli profunden, ne kontentiĝu per ideoj, sed esploru tiun grundon, en kiu la ideoj enradikiĝas. Ĉar la ideoj ne falas el ĉielo, sed elkreskas el tero, el la kondiĉoj de homa vivado. Ne kontentiĝu kun la surbazaĵo, sed rigardu al radiko de l'objektoj, al bazo. Rigardu al produktivaj fortoj kaj produktadaj rilatoj, kiuj formas la ekonomian strukturon de l'socio, la realan fundamenton, sur kiu altiĝas la jura kaj politika surbazaĵoj, kaj al kiuj respondas difintaj formoj de socio konscio. . . ."

Karl Marx en
„Al kritiko de politik-ekonomio"
Antaŭparolo

Speciala Dokumento sendita de VPEA, Hanojo

# TRIA SPECIALA KOMUNIKAĵO

**de la Komandantaro de la Popolaj Armitaj Fortoj por Liberigo de Sud-Vjetnamio**

Ekde la nokto de la 29a de januaro 1968 la Popolaj Armitaj Fortoj de Liberigo kaj la tuta sudvjetnama popolo jam impulsis kaj plue impulsas la ofensivon kaj la leviĝon, kiuj ĝis nun ne konitan famon ha-**vis.**

Dum ĉirkaŭ 30 tagoj eksterordinare gloraj, la armitaj fortoj kaj la loĝantaro lanĉis atakojn kaj leviĝis en ĉiuj urboj, urbaj centroj kaj provincaj ĉeflokoj de Sud-Vjetnamio. Ili trafe batis preskaŭ ĉiujn malamikajn rifuĝejojn, grandajn samkiel malgrandajn, je ĉiuj ŝtupoj, de Sajgono, Hue, ĝis en la provincoj. Ili kontrolis multajn regionojn kaj lokojn, kaj kaŭzis pezajn perdojn al la usonaj marionetaj kaj satelitaj trupoj, same kiel al la marioneta administracio. En pluraj lokoj, ili lanĉis ripetiĝantajn atakojn kaj fiaskigis ĉiujn malamikajn kontraŭatakojn.

La armitaj fortoj kaj la loĝantaro de Sud-Vjetnamio gajnis grandegajn venkojn sur ĉiuj kampoj.

Ili ekstermis grandan parton de la malamikaj vivfortoj. Laŭ la unuaj statistikoj pli ol 90.000 malamikoj estis mortigitaj, vunditaj aŭ kaptitaj, el kiuj pli ol 20.000 usonaj agresantoj kaj alilandaj dungosoldatoj Estis neniigitaj pluraj malamikaj unuoj, el kiuj 3 kirasregimentoj, 39 batalionoj de infanterio, de pioniraro, de policfortoj, de motorizita transportado (plejparte batalionoj de infanterio), 8 kiraseskadronoj kaj 120 rotoj. Temas tie ĉi pri ekstreme granda sukceso: Nur dum kvar semajnoj, la sudvjetnamaj armeoj kaj loĝantaro ekstermis nombron da malamikoj egalan al kvarono de la suma cifero de 1967, nombron da malamikaj batalionoj egalan al tri-kvaronoj de la suma cifero de 1967, jaro kiu enregistris venkojn pli grandajn, ol en iu ajn pasinta jaro. La marioneta armeo amase dizertis. Dum la unuaj tagoj de februaro, tiu dizerto nombris pli ol 200.000 homojn, kaj nuntempe ĝi graviĝas tiagrade, ke la malamiko neniel povas savi la situacion. Ankaŭ la milicoj, la regionaj trupoj kaj la marioneta polico grandparte dizertis.

...Laŭ statistikoj, kiujn ni jam sukcesis starigi, pli ol 1800 aviadiloj kaj helikopteroj estas faligitaj kaj detruitaj, sur la tero pli ol 1300 tankoj, kirasĉaroj, miloj da aliaj militveturiloj, 90 militŝipoj kaj kanonoj, kaj milionoj da tunoj da bomboj, obusoj kaj brulmaterialoj estas detruitaj. Tiuj ciferoj prezentas tri kvinonojn da aviadiloj kaj helikopteroj, trionon de kirasĉaroj kaj du kvinonojn de militboatoj detruitaj dum la jaro 1967. Tio estas unu al la plej seriozaj malvenkoj de la malamiko. Lia pafpotenco kaj la moviĝemo de liaj trupoj grave malfortiĝas. En multaj lokoj al la malamikaj unuoj mankas municioj, nutraĵoj, brulmaterialoj, kaj ili suferas grandajn malfacilaĵojn en siaj manovroj, alilokiĝoj kaj helpoperacioj. La unua usona aermobila divizio disponas nur pri duono de siaj aparatoj.

Ni neniigis. devigis al kapitalaco aŭ al retiriĝo pli ol 700 postenojn kaj gardoturojn. Ni komplete malsukcesigis vitalan planon de la malamiko, la plano pri „Kampara pacigo". Ni liberigis el sub lia jugo

unu plian milionon kaj ducent milojn du personoj. Ni kontrolas la pli grandan parton de vastaj kamparaj etendaĵoj starigantaj la strukturojn de la revolucia potenco je ĉiuj ŝtupoj. Naskiĝis la Revolucia Popola Komitato de Thua Thien-Hue, prenanta sur sin la glorajn respondecojn de popola administracio en provinco kaj urbo.

... Kun la celo vuali siajn malsukcesojn kaj nin minaci, la usonaj agresantoj kaj la Thieu-Ky-kliko sin turnas al bomboj, toksaj ĥemiaĵoj kaj venengasoj por masakri la sudvjetnaman loĝantaron kaj detrui multnombrajn loĝejojn, senhejmigante dekmilojn da niaj sampatrujanoj. Incendiinte la domojn de aliuloj, tiaj barbaraj kaj abomenindaj piratoj ankoraŭ krias helpon al homoj kies parencoj estas mortigitaj, kies domoj bruligitaj de ili mem! Per tio, ili intencas ĵeti siajn kulpojn sur aliulojn, sed iliaj sovaĝaj kaj perfidaj manovroj neniam sukcesos nin trompi same kiel iliaj bomboj neniam sukcesos nin timigi. Kvazaŭ oleo surverŝita sur fajron, tiaj fiagoj nur pliakrigas nian malamon kaj transformas ĝin en fulmojn falantajn sur ilian kapon.

... Nepre ili centoble pagos pro siaj krimoj. Por ni, nenio estas pli valora ol sendependeco kaj libereco. Por ni, kiuj preferas morti ol vivi, en sklaveco, nenio povas ŝanceli nian firman decidemon batali kaj venki la agresanton.

La lukto de nia popolo kontraŭ la usona agreso por nacia savo ĝuas la plej varman simpation kaj la plej grandan subtenon de la tuta socialisma tendaro. Ni tenas en mano la plej grandajn avantaĝojn kaj la plej firmajn bazojn.

Nia pozicio kaj nia forto radias kiel brilo de leviĝanta suno.

La pozicio kaj la forto de la malamiko pli kaj pli deklinas.

Ni nepre gajnos la kompletan venkon.

La pozicio kaj la sorto de la malamiko pli kaj pli deklinas.

La malamiko sen ia dubo suferos totalan malvenkon.

VJETNAMA PACDEFENDA
ESPERANTISTA ASOCIO
68, Ly Thuong Kiet, Hanojo —
Vjetnamio

# Pri la Esperanto-kongresoj en Bulgario

Varna ne nur estas belega kaj fama ripozloko ĉe la Nigra Maro, sed ankaŭ ideala loko por kongresoj. Tio denove pruviĝis dum junio 1968, kiam tie okazis tri esperanto-kongresoj. La 37a Bulgara Esperanto-Kongreso, la Bulgara Junularo-Esperanto-Kongreso kaj la 20a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso plene sukcesis.

La ministro por trafiko de la Popolrespubliko Bulgario, Marin Vaĉkov, estis la alta protektanto de la IFEF-kongreso, kiun li salutis per malferma parolado en la „Popolteatro" de Varna. Tiam sekvis pluaj altrangaj personecoj, poste la reprezentantoj de la landaj organizaĵoj. En la nomo de la Centra Laborrondo kaj Esperanto-fervojistoj de GDR, la prezidanto de la Esperanto-amikoj el la distrikto Schwerin, Hans Diedrich, salutis la jubilean IFEF-kongreson. Li substrekis, ke la Esperanto-Movado nur povas evolui kune kun la socia progreso. Tial ni subtenas IFEF en la batalo por la paco, ĉar ni scias, ke nur dum paco nia por-kaj per esperanta-laboro povas sukcesi.

La IFEF-kongreson vizitis 780 fervojistaj esperantistoj el 22 landoj, inter ili 33 el GDR.

Dum la kongresaj tagoj Varna estis feste ornamita per flagoj, esperantlingvaj solganoj kaj afiŝoj, aŭtobusoj plenaj kun esperantistoj. Imponaj estis la oficialaj akceptoj, la bankedoj kaj la kongresbaloj. Granda travivaĵo estis la spektakloj de la Bulgara Esperanto-Teatro. La komedio „Akridoj" trovis grandan aplaŭdon.

La 37a Bulgaran Esperanto-Kongreson partoprenis 1600 esperantistoj, inter ili 200 eksterlandanoj. El Germana Demokratia Respubliko partoprenis oficiala delegacio. Altrangaj bulgaraj reprezentantoj de sociaj organizaĵoj salutis la kongreson, sekvis la gvidantoj de la eksterlandaj esperanto-delegacioj. La prezidanto de CLR R. Graetz salutis la kongreson en la nomo de la Espe-

rantistoj de GDR, raportis pri la laboro de nia organizaĵo kaj la subtenon por nia porpaca batalo kaj dankis la Bulgaran Esperanto-Asocion pro la modela laboro, per kiu ĝi ankaŭ helpis nin en estinteco.
Dum la kongrestagoj la kongresanoj montris tre bonan disciplinon. La granda laboro de la kongreso estis fruktedona. Okazis fakkunsidoj. Unuanime reelektiĝis k-do Nikola Aleksiev kiel Prezidanto de BEA.
Impona estis la kilometre longa manifestacia marŝo de la kongresanoj al la frata monumento kun meto de florkrono kaj floroj je la frata tombejo.
Bonajn sukcesojn povis raporti la Bulgara Esperanto-Asocio ĝenerale. 7000 Esperantistoj en Bulgario estas organizitaj en kluboj. Gravaj ankaŭ por nia laboro estas la gazetoj „Nuntempa Bulgario", „Ripozoj" kaj „Bulgarino".
Pro ilia gastamo kaj pro ilia modela laboro ni dankas al niaj bulgaraj amikoj.

La kongresoj en Varna certe donis impulsojn por pluaj sukcesoj en Bulgario kaj por aktiva porpaca esperanto-laboro en aliaj landoj.

**BEJ fiere raportis**

La 20-an de majo okazis en la kadro de la 37-a Bulgara Esperanto-Kongreso en Varna la laŭstatuta kongreskunveno de Bulgara Esperanto-Junularo. En konferenc-salonego de la Distrikta Komitato de la Bulgara Komunista Partio kolektiĝis 200 delegitoj el ĉiuj regionoj de la Popola Respubliko Bulgario por raporti kaj interkonsiliĝi pri sia agado dum la pasinta legislatura periodo.

Ĉeestis kaj salutis la kunvenon reprezentantoj de 5 ŝtatoj. Nome de la Esperanto-Junularo en GDR parolis Hans Eichhorn. Li transdonis la salutojn kaj bondezirojn de la Junulara Sekcio de CLR. Fiere la delegitoj poste aŭskultis ampleksan raporton de la estraro fare de Boĵidar Leonov (vicprezidanto). Per ĝi ni informiĝis, pri la kreskanta forto de BEJ. Momente ĝi prezentas trionon de la membraro en BEA. La ĉiujaraj kulturaj Esperanto-festivaloj estis vizitataj meze de 1500 gejunuloj. Sub protektado de la bulgara Komsomolo ili evoluis al gravaj kulturaj eventoj — ne nur por esperantistoj. Ilia riĉa programo respegulas la aktivecojn de junularaj grupoj kaj societoj tra tuta Bulgario.

La raporto konklude konstatas, ke la bazo por la agado de BEJ estas la politiko de la Bulgara Komunista Partio kaj de la bulgara Komsomolo.

Post malŝarĝigo de la estraro oni novelektis estraron kun 13 anoj. Kiel nova prezidanto elektiĝis Boĵidar Leonov.

---

... La historio de ĉia ĝisnuna socio estas la historio de klasbataloj.
Liberulo kaj sklavo, patricio kaj plebejo, barono kaj servutulo korporacia majstro kaj helpisto, unuvorte subpremanto kaj subpremato staris en konstanta antagonismo al si reciproke, kondukis seninterrompan, jen kaŝitan, jen malkaŝan batalon, batalon, kiu finiĝis ĉiufoje per revolucia transformo de l'tuta socio aŭ per la komuna pereo de la batalantaj klasoj.
. . . . . .
La moderna burĝa socio, elirinta el la pereo de l'socio feŭdala, ne forigis la klasajn antagonismojn. Ĝi metis nur novajn klasojn, novajn kondiĉojn de l'subpremo, novajn formojn de l'batalo sur la lokon de la malnovaj ..."
el la „Komunista Manifesto"

# Ni intervjuis . . .

Post la solena fermo de la 37-a kongreso de Bulgara Esperanto-Asocio ni kaptis la okazon peti **Nikola Aleksiev** pri ekskluziva intervjuo.

S-ro Aleksiev reelektiĝis prezidanto de BEA kaj funkcias prezidanto de MEM. Li estas unu el la plej konataj reprezentantoj de bulgara Esperanto-movado, kiu sub lia gvido evoluis al efika kaj multnombra asocio.

**„d. e.“ :** Ni partoprenis vian 37-an kongreson kaj hejmenportas spertojn, aplikeblaj en nia propra laboro. Kiel vi — denove elektita prezidanto de CK de BEA — pritaksas la signifon kaj rezultojn de via kongreso?

**N. Aleksíev:** La 37-a kongreso de bulgaraj esperantistoj estis la plej amase vizitita kaj tre rezultodona nia landa Esperanto-kongreso. Krom la klare formulitaj estontaj taskoj por la kvarjara periodo ĝis la 38-a kongreso, estis voĉdonitaj tre gravaj decidoj en ligo kun la pliformigo de niaj mezaj gvidorganoj — la distriktaj komitatoj de BEA. La ĝisnuna praktiko montris, ke la distriktaj komitatoj povas ludi decidan rolon en ĉiuj aferoj de la esperantista agado: organizado de novaj societoj kaj sistema kontakto kun la jam ekzistantaj: organizado de kursoj por komencantoj, progresintoj kaj speciale por geinstruistoj, kiuj solaj havas la rajton instrui Esperanton en la lernejoj: pliriĉigo de la kultur-kleriga agado de la societoj kaj la komitatoj; aktiva partopreno en diversaj formoj de konstruado de la socialisma sociordo. La Centra komitato de BEA turnas specialan atenton ankaŭ al la organiza stabiligo de la sekcioj laŭ profesioj kaj interesoj. La kongreso pruvis elokvente, ke ekzistas grandaj objektivaj eblecoj transformi nian BEA en unu el la plej amasaj kaj organizitaj taĉmentoj de la tutmonda esperantista movado.

**„d. e.“ :** Kiaj estas viaj planoj rilate la Esperanto-movadon en via lando por la sekva mandata periodo?

**N. Aleksiev:** Niaj planoj por la sekvanta periodo estas ligitaj precipe kun la realigo de la rezolucio, unuanime aprobita de la kongresa-

noj. Ĝi aperos en nia monata organo „Bulgara esperantisto“ kaj estos je dispono de ĉiu, kiu interesiĝas pri ĝi. La ĉefajn punktojn, ĉirkaŭ kiuj koncentriĝos nia estonta agado, mi jam montris en la respondo de via unua demando. Mi nur deziras aldoni, ke la Estraro de nia Asocio jam akceptis konkretan laborplanon por la periodo ĝis la fino de 1969. Laŭ ĝi en la centro de nia asocia aktiveco troviĝas la 25-a datreveno de la socialista revolucio en Bulgario, transforminta nian landon el agrara provinco de la grandaj kapitalistaj landoj en industrian ŝtaton kun grandbiena kooperativa kamparmastrumado. La esperantistoj fieras pri sia renaskiĝinta patrio, kiu kreis tre bonajn kondiĉojn ankaŭ por vasta peresperanta agado en la intereso de l'amikeco kaj la interkompreniĝo de l'popoloj.

**„d. e.“:** BEA — kiel unu el la plej modelaj asocioj en la mondo — ege influas la evoluon de la Esperanto-Movado. Kiel vi pritaksas viajn internaciajn kontaktojn kaj en kia senco vi agadas internacie?

**N. Aleksiev:** Nia Asocio zorgeme rilatas al la internaciaj kontaktoj kun multaj landaj kaj internaciaj Esperanto-organizaĵoj. Ni havas certan kvanton da individuaj membroj de UEA kaj la Asocio membras kolektive, havante kvin komitatanojn. En nia lando funkcias delegitara reto de UEA. Bulgara Esperanto-Junularo membras en TEJO. Kiel sciate, prezidanto de STELO estas bulgara studento. La prezidanteco de MEM estis koncentrita ankaŭ en nia lando. Unu vicprezidanto de la Akademio de Esperanto estas bulgaro. La redakcio de „Internacia ĵurnalisto“ troviĝas en nia lando, kiel ankaŭ la bultenoj de la poŝtistoj, poŝtmarkkolektantoj, de la specialistoj pri kamparmastrumado.
La fakto, ke en Bulgario okazis dum la lastaj kvin jaroj kvar internaciaj Esperanto-kongresoj / UEA, TEJO, STELO, IFEF du internaciaj laborbrigadoj de junaj esperantistoj, internacia konferenco de MEM-estraranoj k. a., montras, ke bulgaraj esperantistoj estas fidelaj al la internacia esperantista solidareco. Laŭ siaj eblecoj ili donas propran kontribuon al la plifortikiĝo kaj populariĝo de la internacia Esperanto-movado. Pri niaj internaciaj kontaktoj atestas ankaŭ nia partopreno en la Universalaj Kongresoj, seminarioj, festivaloj k. a. okazintaj en aliaj landoj. Oni povas pli speciale akcenti pri la Balkana Esperantista Konferenco en Belgrad en 1966.
Ni estas pretaj pripensi serioze kaj detale ĉiun novan proponon por plilarĝigo de niaj internaciaj kontaktoj en la intereso de la Esperanto-movado.

**„d. e.“:** Ni — la esperantistoj en GDR — multe ŝuldas al la sindona laboro de BEA. Kiel laŭ via opinio ni povas estonte plibonigi niajn interrilatojn?

**N. Aleksiev:** Niaj interrilatoj kun la Centra Laborrondo de Esperanto-amikoj en GDR estas plenaj de amikeco kaj fido. Ni kore ĝojas pri viaj rapidaj sukcesoj dum la lastaj jaroj kaj esperas ke vi plimultigos ilin baldaŭ. Ni kunlaboras modele en la sfero de MEM-agado, ni subtenas personajn kontaktojn kun elstaraj reprezentantoj de la esperantistaro en GDR. La atento, kiun vi montris al nia 37-a landa kongreso, viaj amikaj kaj sinceraj mesaĝoj al niaj kongresanoj, la enhavoplenaj interparoloj post la kongreso — ĉio ĉi montras, ke inter ni ekzistas kamaradeco kaj plena konkordo.
Laŭ mi estas dezirinde en la kadroj de niaj realaj eblecoj havi pli oftajn personajn kontaktojn ne nur en ligo kun tiaj Esperanto-eventoj kiaj estas niaj landaj kongresoj, sed ankaŭ en ligo kun gravaj aferaj iniciatoj el nia ĉiutaga esperantista agado. Tiuj kontaktoj povas tuŝi interrilatojn de la Esperanto-movado en

ambaŭ landoj, povas ankaŭ trakti problemojn kun pli vasta signifo, prezentanta intereson ankaŭ por alilandaj Esperanto-movadoj precipe en socialistaj landoj, kiel ekz. eldonado de literaturo kun marksisma-leninisma enhavo k. s. La stato de la internacia Esperanto-movado, la plifortigo de MEM kaj nia kontribuo sur tiu tre grava tereno povas kaj devas prezenti komunan intereson kaj temon pri ambaŭflankaj kontaktoj.

**„d. e.“:** La evoluo de Esperanto-movado en socialistaj landoj ne estas pensebla sen dialektika konekso kun la socia evoluo, kiu respeguliĝas en la organizita konstruo de la socialismo.

Kiel laŭ via opinio la esperantistaro povas kontribui al la socialisma konstruo?

**N. Aleksiev:** La esperantistaro en socialistaj landoj havas grandajn eblecojn partopreni aktive en la formiĝo de la nova sociordo. Ĉar la esperantistoj ne ŝvebas en la aero, sed havas sian konkretan lokon en la socialista socio, ili devas esti modelaj en la plenumado antaŭ ĉio de siaj profesiaj taskoj kie ili laboras, oficas aŭ studas. La disciplinita en sia profesia agado esperantisto povas kun pli granda persona aŭtoritato gvidi peresperantan kaj poresperantan agadon. Oni kun fido rilatos al liaj esperantistaj iniciatoj. Ankaŭ la estraroj de koncernaj ekonomiaj kaj sociaj organoj kaj organizaĵoj donus sian helpon al esperantistoj, kiuj marŝas en la unuaj vicoj de la konstruantoj de l'socialismo.

Je tiu bazo la esperantistoj en niaj landoj povas entrepreni ankaŭ iniciatojn pri kreo de internaciaj korespondaj kaj personaj kontaktoj kun esperantistoj el aliaj socialistaj aŭ nesocialistaj landoj, povas interŝanĝi profesian, teknikan, sciencan sperton kaj literaturon, popularigi la konkretajn sukcesojn en la konstruado de l'socialismo en aliaj landoj, povas propagandi la pacaman politikon de la socialistaj landoj ktp. Estas tre boninflua inter neesperantistaj rondoj la publikigo de informoj, korespondaĵoj, leteroj, artikoloj k. s. en la nacilingva gazetaro, radio kaj televido. Tio kreas respekton al la agado de l'esperantistaro, ĉar la popoltavoloj komprenas, ke la esperantistoj luktas por la efektivigo de grandaj taskoj de nia socialista socio, materiala kaj kultura evoluo de la lando, eduko en spirito de patriotismo kaj internaciismo, aktiva partopreno en la pacbatalo, disvolviĝo de amikeco kaj interkompreniĝo de la nacioj ktp. En tiu direkto tre bone efikas ankaŭ la kunlaborado kun parencaj neesperantistaj sociaj organizaĵoj kaj movadoj — profesiaj, kulturaj, pacdefendaj, junulaj, virinaj k. s.

Speciale en Bulgario ni sukcesis larĝskale nuligi en neesperantistaj rondoj la imagojn, ke ni okupiĝas pri sektanecaj, pure internaj esperantistaj problemoj, kiuj ne prezentas intereson por la socialista socio. Oni tre ŝatas nian aktivecon en la sfero de la internaj kaj internaciaj interesoj de nia popolo. Kaj kiel konstatis multfoje diverslandaj partoprenintoj en internaciaj Esperanto-kongresoj okazintaj en Bulgario, la loĝantaro, la gazetaro, la radio kaj la televido ne estas indiferentaj al la esperantistoj. Male — ili manifestas oficiale kaj neoficiale siajn simpatiojn al ni kaj al nia agado.

**„d. e.“:** Permesu lastan demandon: Kiu estas via plej aktuala persona deziro por la estonto?

Permesu al mi esprimi la esperon, ke la esperantistaro el niaj du landoj marŝos en la avangardo de saviga por la tuta homaro lukto de nia revolucia epoko.

**„d. e.“:** Ni tre dankas por tiu ĉi intervjuo.

# Termino:

Antaŭ iom da tempo mi proponis eltrovi kaj fiksi ĝustan esperanto-terminon por la germanlingva vorto „Komplementär". Se ni volas esti efikplenaj en nia laboro, tiam estas tre grave, ke ni esprimu nin klare.

En „der esperantist" n—ro 20/21 1968 (paĝo 3) mi konstatis, ke tie la vorto „Komplementär" estas tradukita per la termino „komanditisto". Per tiu vorto la legantoj en aliaj landoj ricevas tute neĝustan impreson de niaj duonŝtataj entreprenoj. Komanditisto estas homo, kiu nur estas mondonanto al entrepreno, sed mem restas malaktiva en ĝi. Tute kontraŭe la „Komplementär". Li ne nur laboras aktive en la entrepreno, sed en niaj duonŝtataj entreprenoj eĉ li estas la ĉefo, la gvidanto. Tion klare diri estas tre grave, ĉar nia GDR per tiu ĉi solvo eĉ donis kaj donas al nemonopolistaj kapitalistoj en GDR bonan personan perspektivon. Tiu ĉi formo ankaŭ povos esti bona ekzemplo por tiu aŭ alia lando sur nia terglobo, kiu deziras ekiri nekapitalisman vojon. Certe ĝi ankaŭ estas plaĉa perspektivo por tiu aŭ alia entreprenisto en tiaj landoj. Sed tian komprenon laŭ mia opinio ni ne atingis per la esprimo komanditisto, kiam temas pri duonŝtataj entreprenoj.

Laŭ nia scio ankoraŭ ne ekzistas esperanto-termino por „Komplementär". „Gvidanta privatkompaniano en duonŝtata entrepreno" estus tro longa. „Aktiva komanditisto" aŭ „Aktivkunlaboranta komanditisto" ŝajnas al mi ankaŭ ne sufiĉe trafa. Do ni bezonas taŭgan terminon por tiu ĉi nocio. Tial kara leganto, skribu vian opinion al nia terminara komisiono. Gi akceptu la proponojn kaj decidu pri la plej trafa esprimo. Rudi **Graetz**

# El la laboro de la Terminar-komisiono

Por la traduko de precipe novaj esprimoj la komisiono rekomendas:

| | |
|---|---|
| Eiskunstlauf | — artisma glitkurado sur glacio |
| Alleinvertretungsanmaßung | — arogo pri ekskluziva reprenzentado |
| Lager des Sozialismus | — socialisma landaro |
| Bildungsnotstand | — kriza stato de klerigo |
| Handschellengesetze | — katenigaj leĝoj |
| Leistungssport | — intensa sporto, rekordcela sporto |
| Notstandsverfassung | — escepta konstitucio pri kriza stato |
| Ermächtigungsgesetz | — plenpoviga leĝo |
| Produktionsgenossenschaft | — kooperativo por produktado |
| sozialistisches Menschenbild | — modelo de socialisma homo |
| Rechenschaftslegung | — agadraporto |
| Umdenkungsprozeß | — transformiĝo de pensado |
| Verfügungsgewalt über Kernwaffen | — disponpovo pri nuklearmiloj |

**Rostock**

Der Deutsche Kulturbund, Arbeitsgruppe Esperanto in Rostock, hatte zum Kursabschlußfest in sein Kulturhaus eingeladen.

Nach einem halbjährigen Studium der internationalen Sprache, welches mit einer kleinen Examenarbeit abgeschlossen wurde, war nun Grund genug vorhanden, auch einmal zu feiern.

Einleitend wies Bdfrd. Plate als Kursleiter noch einmal auf die hohe politische Bedeutung des Esperanto im Friedenskampf um die Verständigung der Völker hin. Ist es doch das erste Anliegen der Esperantofreunde, unsere Republik im Briefverkehr mit ausländischen Esperantisten, bei der Teilnahme an Esperanto-Tagungen im Ausland oder sonstigen Begegnungen mit ausländischen Esperantisten unsere Friedenspolitik zu vertreten.

Ein Brief aus Japan, der verlesen wurde, zeigte, wie die japanischen Friedensfreunde ihren Kampf gegen die USA-hörige Sato-Regierung in Japan führen. Sie berichteten ferner unseren Esperantofreunden, wie sie den heldenhaften Kampf des vietnamesischen Volkes gegen die USA-Aggressoren unterstützen. Gleichzeitig erfuhren wir, welche Hilfe sie den desertierten USA-Fliegern durch das japanische Komitee für Frieden in Vietnam zuteil werden lassen.

Der polnische Esperanto - Bund, Gruppe Szczgin, machte uns den Vorschlag, als Partnerstädte am Baltischen Meer einen Patenschaftsvertrag abzuschließen. Sie werden uns zur Ostsee-Woche besuchen, um dann über einen entsprechenden Vertrag für Frieden und Freundschaft zu beraten.

Es zeigt sich also, daß das Esperanto-Studium keineswegs nur ein Hobby ist. Diese internationale Sprache schafft in zunehmendem Maße Möglichkeiten, die Friedensfreunde aller Erdteile zu gemeinsamen Aktionen anzuregen.
Nach der Auszeichnung der besten Arbeiten im Studium mit Esperanto-Buchprämien verlief der Abend bei Tanz und froher Geselligkeit.

Aenne Hannke

**Löbau**

Am 12. Mai trafen sich in Löbau zum zweiten Male die Oberlausitzer Esperantisten der Kreise Bischofswerda, Bautzen, Löbau, Görlitz, Niesky und Zittau. Wir hatten zahlreiche Korrespondenz-Exponate ausgestellt. Die Görlitzer sangen wiederum Lieder in Esperanto. Von den Mitgliedern der Bezirksleitung Dresden, die auch zahlreiche Esperantoliteratur zum Kauf anboten, trug K-do Wald ein Gedicht in Esperanto vor. Zwei anwesende tschechische Sprachfreunde würdigten vor allem die gute Zusammenarbeit aller Esperantogruppen in unserem Gebiet. Für das kämpfende Vietnam wurden 60,— M gesammelt und dem Kulturbund übergeben.
Am 22. Juni fand ein gelungener Abschlußabend des 2. Anfängerzirkels statt. Von 23 Anwesenden waren 10 aus dem letzten Lehrgang. Ihnen wurde noch folgender Übersetzungssatz zum Knobeln vorgelegt: „Ich weiß das, daß das **das,** das das Mädchen übersetzte, das **das** ist, das das meiste Kopfzerbrechen macht". Ein Farbdiavortrag, ein selbstgedrehter Schmalfilm aus unseren Gruppenveranstaltungen, gemeinsame Esperantolieder usw. hielten die Anwesenden bis nach 24 Uhr beisammen.

O. Walter

**Zittau**

La 28-an de aprilo de 1968 Esperantistoj el Zittau kaj Bautzen reciprokis la viziton de ĉehoslovakaj geamikoj en aŭtuno 1967. Karavano de du aŭtobusoj kaj du privataj aŭtomobiloj, al kiuj survoje alvicigis du aŭtomobiloj kun Esperantistoj el Nový Bor kaj Česka Lipa, alvenis en la urbeto Doksy apud la Mácha-lago.

Post refreŝiga restado apud tiu-ĉi bela ripozloko ni preterveturis la ruinojn de la antikva kastelo Bezdež kaj baldaŭ alvenis en Mladá Boleslav, kie bongusta tagmanĝo atendis nin.

Plua aŭtobuso kun la loka Esperantistaro sekvis ekde nun la geamikan karavanon kaj komune ni vizitis la kastelojn „Humprecht“ kaj „Kost“. La plej interesa vizitindaĵo estis la tielnomita „akustika manĝejo“, cilindra salono kun multopa eĥo. Krome oni povis rigardi ekspozicion pri la ĉeĥa verkisto Frant. Šramek.

Kastelo Kost estis tre interesa historia konstruaĵo, kiu oftege ŝanĝis la posedintojn. Ankaŭ Wallenstein loĝis tie dum la lastaj du jaroj antaŭ sia morto. En la ĉefa salono estis montrata ekspozicio de mezepokaj lignoskulptoj kaj altarpentraĵoj, kiuj estas unikaj trezoroj. La interna korto vekis la impreson, ke la kavaliroj ĵus ekforlasis drinkdibočadon, ĉar lignaj bareloj, drinkujoj, sidoj ktp. staris en pitoreska malordo ĉirkaŭ lignokarba fajrejo kun turnebla rostlanco. Sed ili nur estis la postlasaĵoj de ĉeĥoslovaka film-teamo, kiu ĵus produktas historian filmon.

La vesperon ni pasigis en la urbeto Hradiŝte. Salutparolis la sindikata estraro de la uzino „Skoda“ kaj la prezidantoj de la E-grupoj de Mladá Boleslav, Zittau kaj Bautzen. Ni, gastoj, ricevis memorige sesopon de bierglasoj kun simboloj de historiaj Škoda-automobiloj. Ĉeĥaj muzikantoj poste ludis kantojn kaj dancojn kaj interamika babilado kaj dancado kronis la belan dimanĉon.

Linde Heinze, Bautzen

**Karl-Marx-Stadt**

Am 29. Juni fand in Karl-Marx-Stadt eine Aktivtagung statt. Über 40 Delegierte aus vielen Kreisen des Bezirkes diskutierten lebhaft aktuelle Probleme aus der praktischen Arbeit.

Einleitend wertete Bdfrd. Fiedler, 1. Bezirkssekretär des Deutschen Kulturbundes, den VII. Bundeskongreß des DKB aus. Er würdigte dabei das progressive Wirken vieler Esperantofreunde im Bezirk. Bdfrd. Würker, 1. Vorsitzender des Bezirksarbeitskreises Esperanto, gab einen Situationsbericht über die Tätigkeit der einzelnen Kreise und Gruppen und konnte dabei wertvolle Hinweise zur Verbesserung der Arbeit geben.

Neu und fruchtbar war nach dem gemeinsamen Meinungsaustausch die Fortführung der Diskussion in verschiedenen Arbeitsgruppen, deren Leiter gegen Ende der Tagung den Delegierten das Ergebnis ihrer speziellen Beratung mitzuteilen hatten. Mit einer Zusammenfassung durch Bdfrd. Knapp, Mitglied des ZAK, und der Neuwahl des BAK endete diese erfolgreiche Tagung.

# Lingvo-Konkurso el n-ro 20/21

Lingvospertuloj — komisitaj de CLR — pene sukcesis elekti la plej bonajn tradukojn el multo da alvenintaj leteroj. Montriĝis, ke laŭ fideleco rilate la originalon kaj senerareco preskaŭ ĉiuj konkursaĵoj egalis. Decidis la stilo, kvankam ĝi estas malfacile mezurebla. Tamen la elektintoj (Renate kaj Dieter Berndt, Hans Eichhorn, Rudolf Burmeister) kuraĝis nomi gajnintojn:

1. Harry Dost, Karl-Marx-Stadt
2. Dr. Karl Schulze, Berlin
3. Herbert Rothe, Karl-Marx-Stadt

4.—14. Dr. Martin Schüler, Klein-Machnow; Ernst Muthschall, Halle; Karl Meinel, Ellefeld; R. Theurich, Niesky; Willy Gau, Berlin; Wilfried Hofmann, Karl-Marx-Stadt; Fritz Becker, Parchim; Paul Straach, Netzschkau; Edmund Grünthal, Wismar; Linde Heinze, Bautzen.

(La premioj jam forsendiĝis.)

Ĉ sube ni prezentas al vi la tradukon de la gajninto, s-ro Harry Dost, konsciante pri eventualaj plibonigoj, kiujn vi eltrovos. La traduko instigu vin, aranĝi diskuton en via laborrondo.

1. Konsiderante la responson montri al la tuta germana nacio vojon en estontecon de paco kaj socialismo,

   frunt'al frunte kun la historia fakto, ke la imperiismo, gvidata de Usono, interkonsente kun tavoloj de la okcidentgermana monopola kapitalo disfendis Germanion, celante fari Okcidentgermanion bazo de imperiismo kaj kontraŭsovetia batalo, kontraŭa al la vivinteresoj de la nacio,

   la popolo de la Germana Demokratia Respubliko, bazanta sin fortike sur la atingaĵoj de la kontraŭfaŝiste -demokratia kaj socialisma renversoj de la socia ordo, unuece en siaj laborulaj klasoj kaj tavoloj daŭriganta la verkon de la konstitucio de la 7—a oktobro en ĝia spirito, kaj instigita de la volo daŭrigi senhezite laŭ libera decido la vojon de paco, socia justeco, demokratio, socialismo kaj interpopola amikeco donis al si ĉi tiun konstitucion.

---

2. „Per nenio decida la majstro de Ĉilio sukcesis oponi la nesupereblan rapidecon. Ĉar ankaŭ la GDR—a defendo pli kaj pli bone kontrolis la atakon de la gastiginto, komence tiel diable danĝeran kaj lacerte viglan (Körner paralizis tiele la timindan L. Sanchez, ke li fine devis esti anstataŭigita), iom post iom la studenta teamo, aperinta kun tiom da espero sur la futbalejo, plenrezigne cedis. Nur la ekstremrapida Araya iafoje eskapis de la Halleano Bransch kaj kaŭzis iometan maltrankvilon antaŭ la gola kesto de Blochwitz."

# Lingvo-Konkurso II

La multnombra partopreno en la unua konkurso pruvis, ke estas vera intereso pri perfektiĝo kaj konkreta ekzercado inter niaj esperantistoj. Pro tio ni hodiaŭ sekvigas duan:

1. Germanigu sekvan citaĵon el verkaĵo de Karl Marx:

   „ . . . Estas pura famdiraĵo se oni diras ke la krizoj estiĝas el manko de pagpovaĵ konsumantoj. Aliajn konsumantojn ol pagantajn la kapitalista sistemo ne konas, escepte almozulojn kaj ‚friponojn'. Ke komercaĵoj estas nevendeblaj, signifas nur ke ne troviĝas por ili pagokapablaj aĉetantoj, sekve konsumantoj. Sed se oni volas doni al tiu famdiraĵo ŝajnon de pli profunda praveco per aserto ke la laborista klaso ricevas tre malgrandan parton de sia propra produktaĵo, kaj ke la malbono povus esti korektata se la laboristoj recevus pli grandan parton, se ilia salajro kreskus, sufiĉas rimarki ke krizoj ĉiukaze prepariĝas ĝuste per periodo en kiu la salajro ĝenerale plialtiĝas kaj en kiu la laborista klaso konsumas relative pli grandan parton de la pojara produktaĵo destinita al konsumado. Tiu periodo devus — je la vidpunkto de tiuj kavaliroj ‚san- kaj simple- spiritaj' — malproksimigi la krizon. Ŝajnas do, ke la kapitalista produktado entenas kondiĉojn sendependajn de bona aŭ malbona volo, kondiĉojn, kiuj allasas nur por momento tiun relativan prosperecon de la laborista klaso, kaj ĉiam nur kiel antaŭsignon de krizo . . . "

2. Korektu sekvajn frazojn:
   2.1. Josef ordonis al liaj kuracistoj balzami sian patron.
   2.2. Li petis min eniri en la kaverneton de sia lokomotivo.
   2.3. Mi konvinkis, ke li konsolis pri la perdiĝo.
   2.4. Mi deziras vin ĉion bonan.
   2.5. La materialoj estis liveritaj en la pasanta jaro 1967 ĉiam dum la unua semajno de la monato; nur dum decembro ili estas liverata dum la dua semajno.
   2.6. Kaj estis sufiĉe strange, ke en la okuloj de la pli juna fratino naĝis larmo kaj io profunde kaj kore sentata briletis tra la petolaĵo de ŝiaj vortoj kaj pene kun ĝi batalis.

La lasta akceptotago por viaj kontribuaĵoj, sendotaj al Centra Laborrondo Esperanto de GDR, 108 Berlin, Charlottenstr. 60, estas la 15—a de oktobro 1968 (dato de la poŝtstampo).

La premioj por la gajnontoj ĉifoje estas:

1. Ĉeko pri Esperanto-libroj en valoro de 40 m., aĉetendaj en la librovendejo „Karl Marx" Berlin, Karl-Marx-Allee
2. Tri jarkolektoj de la revuo „La Suda Stelo" (1965—1967)
3. „Sub la Jugo" — Romano en tri partoj de Ivan Vazov

4.—10. po jarabono 1969 de la MEM-organo „Paco"

Ni denove alvokas ĉiujn: Amase partoprenu!

# Neologísmoj?

„. . . Rilate ilin (La neologismojn — la red.) la esperantistojn oni povas dividi en du grupojn, en propagandistojn kaj literaturistojn.

La propagandisto volas facilan Esperanton, kiun li povus verŝi rapide, per tute eta funelo, en la kapon de ĉiu homo. Li estus plej feliĉa, se la lingvo konsistuts el ducent vortoj, se oni povus skribi sur poŝtkarton la tutan gramatikon, kaj la tutan vortaron, kun la himno. Li estus tre kontenta, se post sessemajna kurso ĉiu parolus flue kaj komprenus sen vortaro la kolektitajn verkaĵojn de Shakespeare, Dickens, Wells kaj Shaw.

La literaturisto volas riĉan lingvon, volas havi apartan vorton por ĉiu vorto de sia nacia lingvo, apartan vorton por ĉiu nuanco, laueble radikvorton, ĉar la vortojn tro derivitajn kaj kunmetitajn li sentas artefaritaj, malfortaj, senkoloraj. La poeto volas multajn, tre multajn vortojn, por raketi per ili, por trovi per ili freŝajn, neuzitajn rimojn. La poemtradukisto abomenas la kunmetaĵojn, ĉar ili estas tro longaj malhelpas lin en lia vetkuro por mallongo. Ili efektive havas sopiron je la tuta indogermana vort-trezoro kaj amare envidas la kvardekmil vortojn de la feliĉa Shakespeare.

Tiuj du antipodoj, vere, akre batalas inter si, de kiam ekzistas la lingvo. La unuaj riproĉas, ke la neologismoj malfaciligas, konfuzas, kaj fine pereigos la lingvon, argumentas per la orientanoj, kiuj ne konas la vortojn pruntitajn el la Europaj lingvoj. La duaj riproĉas, ke la konservativa partio volas ŝtonigi la lingvon, bari ĝian evoluon, trudi al ĝi malriĉon kaj senornaman simplecon.

. . . . . .

La esperanto literaturo nerezisteble kunportas la riĉiĝon de la vortprovizo. Gi kreas novajn radikvortojn anstataŭ kunmetaĵoj, novajn vortojn por mankantaj esprimoj de nuancoj. Se oni apartigas la v u l g a r a n, aŭ l e r n o l i b r a n vortprovizon, tute ne estos plu danĝera la liberala oficialigo de tiuj ĉi novaj vortoj, precipe, se oni markas per speciala signo, ke ili estas p o e z i a j vortoj.

Tiajn poeziajn vortojn ja havas ĉiu nacia lingvo. Oni uzas ilin nur en poemoj, aŭ en „alta“ prozo. Oni fariĝus ridinda, uzante ilin en la ĉiutaga parolo. Do, ankaŭ en Esperanto neniu parolas jene: „Amara sentimento obsedis mian sinon“, aŭ „mi aklame kunjubilos vian nuptan festregalon“, aŭ „li dronis en la abismoj de la ĉagreno“, aŭ, „ŝi spertis la kluzojn de inunda ploro“. Sed ĉiuj ĉi vortoj estas nepre necesaj en poezio, ĉar neniu alia vorto povas anstataŭi ilin kun plena signifo kaj esprimforto . . . “

el KALOCSAY „Lingvo Stilo Formo“ 1931

# GRAVE!

**Aŭtuna Renkontiĝo en Distrikto Karl-Marx-Stadt**

Ĉiuj junaj esperantanoj venu al . . . . . ?

Loko ankoraŭ sekreta! Sed se vi estos ĝustatempe en Plaŭen (Vogtlando), tiuokaze vi ne maltrafos la kunvenejon.
La Distrikta Renkontiĝo estos la unua evento specifa por junaj esperantanoj en GDR.
UZU GIN ! ! Gastoj eksterlandaj estas atendataj!

Jen la detaloj provizoraj:

1. Dato: 5.—7. Oktobro 1968
2. Loko: . . . . . ? (elirpunkto Plaŭen)
3. Kotizoj: maksimume 20 markojn (inkl. manĝadon, tranoktadon, ekskursojn)
4. Provizora Programo:

Unua tago: — alveno en Plaŭen — urba rondveturo — ekveturo al . . . . . ? . tagmanĝo
— 1—a prelego: Scienca argumentado por internacia lingvo de Detlev Blanke (CLR) Berlin
— diskutado — ekskurso en la ĉirkaŭaĵon de la rekontiĝejo laŭ kaŝe signitaj vojoj kaj kun specialtaskoj — „Amuza Vespero“ (distro, danco, kvizo, kanto)

Dua tago: — 2—a prelego: „Problemoj de junulara Esperanto — movado en internacia kadro“ de Hans Eichhorn (CLR kaj komitatano de TEJO) — Berlin
— 3—a prelego: „El la laboro de esperantistoj en GDR“ de Rainer Knapp (CLR) — Berlin
— diskutado — komunaj lingvo-ekzercoj — lingvotestoj laŭ deziro — sporta konkurso kun nomigo de „GDR — Esperanto — ĉampiono“ — ekskurso al akvobarilo kun boatveturo k. a. — senĝena babilado ĉirkaŭ la kampeja fajro kun transdono de talpoordenoj, ŝercoj, ludoj, kantoj k. a.

Tria tago: — F E S T A R A N Ĝ O okaze de la 19—a jubileo de nia Germana Demokratia Respubliko
— reveturo al Plaŭen — rigardo de kelkaj vidindaĵoj, muzeoj k. a. — ekveturo hejmen.

Via multnombra partopreno pruvos la aktivecon de junaj esperantanoj en GDR.
Do — tuj aliĝu per poŝtkarto (nomo, adreso, aĝo, profesio) al BAK — Esperanto, 90 Karl-Marx-Stadt, Otto-Nuschke-Str. 6.

# DISTRO

## Kontraŭtalpa Raporto N-ro IV

Karaj legantaj kontraŭtalpoj!

Ankoraŭ mi vivetas. Kvankam la protestoj kontraŭ mia agado jam alfluis mi opinias mian agadon necesa!

Ekzemple mi interalie ricevis leteron en kiu skribiĝas jene:
„... mi tute konsentas, ke en viaj kontribuoj oni okupiĝas pri la ekstermado de talpoj. En mia ĝardeno ili ankaŭ multe damaĝas...“ Sed alia simpatiulo skribas: „... Mi tute ne konsentas viajn raportojn, ĉar ili grave vundis mian verdan koron. Jam jardekojn mi portas memfaritan stelon kun diametro de 40 cm kaj ĉiam havis ege interesajn diskutojn kun interesiĝantoj. Laste min alparolis psikiatro, kiu scivolis ĉu mi regule glutas fortajn medikamentojn. Dum majo mi aĉetis en eksterlando (ĉe ni oni ja ne permesas produkti similan) pipon kun granda verda stelo. Tiu ĉi pipo kaŭzis multe da interesiĝo, kaj jam du homoj demandis min, ĉu mi ankaŭ posedas verdan tabakon. Pro ĉio ĉi mi devas tre miri pri viaj kalumnioj kontraŭ niaj senlacaj samideanoj, kiuj ĉiuloke klopodas antaŭenpuŝi nian verdan aferon...“

Nu jes, ankaŭ mi iom antaŭenpuŝetas, tamen — sen verdstela pipo.

Espereble, kara malsamideano, vi uzas cindrujon kun portreto dolĉega de nia majstro (li ripozu trankvile!) surfunde, kantante la HIMNON vi certe purigas vian nazon per verdbrodita tuko kaj se ne ekzistus Esperanto-alumetoj vi rifuzus ekbruli fajron en la forno. Dankon, ke vi ĉiuvespere preĝas „sub la verda standardo“ kaj sonĝas pri „unu granda familio“. Kvankam vi estas kontraŭalkoholulo, vi ŝatas Esperanto-likvoron. Libron pri „La seksaj malsanoj de la formikoj en centra Afriko“ vi certe legus, se ĝi nur estus esperantlingva. Fulmotondro, kion vi faras, se via tualetpapero kun Esperanto-surpreso elĉerpiĝis? Sed eble mi eraras kaj la eldono de esperantlingva prospekto en Kyritz apud Knatter vere venkigos la ideon pri IL?

Certe mi perfide agis, kiam mi rifuzis la instigon de esperantisto el Dresden dum aĉetado en la grandmagazenoj „Centrum“ ĉiam postuli la varojn en Esperanto.

Mi nun konscias, ke la daŭra korespondado kun urbaj instancoj pri esperantigo de la surskriboj en publikaj necesejoj estas la plej urĝa por nia „kara afero“ — por la „finvenko“!

Verda la stelo, verda la naztuko, verda la inko, verda la stampo, verda la menso de esperantisto... ??

FROSTAVALLEN ŝajne ne situas en Esperantio.

Tamen kial ne ekkoni ĝin?

Principare salutas vin via

KT I

# DISTRO

Respondas la Dresdenaj Talpoj . . .

Antaŭ ol ni prezentas nin, bonvolu konvinkiĝi en iu ajn leksikono, ke talpoj estas utilaj estaĵôj. Sekve de tio . . . ‚necesaj' ! — Tamen . . . ni bone scias, ke nia subfosado iam kaj tiam kaŭzas mal — grandajn montetojn, pri kiuj la Mal-talpoj tre diference reagas. Laŭ niaj spertoj ekzistas negativaj kaj pozitivaj Mal-talpoj. La unuaj insultas, kverelas, anstataŭ provi kompreni la talpajn cirkonstancojn. La pozitivaj Mal-talpoj ĉiam estas pretaj, glatigi la malebenaĵojn. Bedaŭre nuntempe en Dresden (ĉu ankaŭ en Pirna?) la pozitivaj Mal-talpoj preskaŭ ĉiuj estas malsanaj, (mankas taŭga kuracisto). Krome ni serĉas ĉi tie „Super-talpon" kiu kapablas obeigi la sovaĝajn, sed tre viglajn Talpojn, por ke la principe ne malutila fosado (legu en leksikono) direktiĝos en la ĝustan direkton.

Aŭskultu, kion ni talpas: „Eĉ dumnokte ni akceptas bone digesteblajn nutraĵojn (legu: afiŝojn, taŭgajn materialojn por elmontraj kestoj). **T 1**

*

La kontraŭtalpaj artikoloj fakte malutilas. Por la „kontraŭtalpoj" ili ne necesas. La „talpojn" ili ne konvinkas. Almenaŭ 99 % de la legantoj nenion komprenas el tiuj paĝoj kaj demandas sin, kial ili por tio elspezis monon. La kritikoj estas tiel kaŭĉukaj, ke ĉiu aŭ neniu povas esti koncernata. La „montrofenestroj esperantistaj en Dresdeno" estas cititaj, sen ke la leganto ekscias ion konkretan pri tio. Ĉu la pseŭdonima verkinto povas doni pozitivan ekzemplon pri de la aranĝitaj montrofenestroj? Ĉu antaŭ la publicon, polemika ago okazis interkamarada konversacio pri tio? Aŭ ĉu ĉiu propagando publika por Esperanto de nia „kontraŭtalpo n-ro l'estas konsiderata kiel „verdismo" ?

Cetere la vorto „esperantano" estas ridinda. Ĉe la 1-a UK en BOULOGNE-SUR-MER en 1905, en la deklaracio pri Esperantismo tekstas: „ . . . Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiuj celoj li ĝin uzas." **L. Schödl**

---

La fama astronomo Newton estis tiel pensema, ke li ofte forgesis manĝi ĝustatempe. Iam li studis tre gravan problemon. Lia mastrino alportis al li malgrandan kuirilon kun varmega akvo kaj freŝan ovon dirante: „Kiam vi volas manĝi, metu la ovon en la bolantan akvon kvar minutojn." Newton konsentis kaj la mastrino foriris. Post unu horo ŝi revenis. Newton sidis penseme apud la skribotablo tenante la ovon en la mano, dum lia ora poŝhorloĝo troviĝis en la bolanta akvo.

Alifoje li promenis apud la bordo de lageto. Li kaptis ranon kaj elpoŝigis sian poŝhorloĝon por kalkuli la pulsofrapojn de la rano dum unu minuto. Fininte tiun ĉi taskon, Newton forĵetis la horloĝon en la lageton kaj metis la ranon en sian vestan poŝon.

**Estimataj kolektantoj,** responde al multaj demandoj hodiaŭ ni publikigas liston de Esp.-poŝtstampoj, aperintaj dum 1967a j. En la sekvontaj numeroj de „der esperantist“ ni publikigos kronologiajn listojn pri ĉiuj ĝis nun aperintaj Esp.-stampoj, Esp.-pm kaj Esp.-pk. Grandan sukceson en kolektado deziras la redakcio de filatela anguleto!

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 1. | Calais | Francio | apr. | E.-kgr en Calais |
| 2. | Poznan | Pollando | apr. | 50 jaroj de la morto Zamenhof |
| 3. | Zielona-Gora | Pollando | apr. | sama |
| 4. | Düsseldorf | GFR | apr. | „Filatelio kaj Esperanto“ |
| 5. | Gniezno | Pollando | apr. | III. zlot esperantistow |
| 6. | Hamburg | GFR | majo | 45a Esp.-kgr |
| 7. | Charleroi | Belgio | majo | 49a Esp.-kgr |
| 8. | Norrköping | Svedlando | majo | 61a Esp.-kgr |
| 9. | Fulda | GFR | jun. | 19a IFEF-kgr |
| 10. | Poznan | Pollando | jun. | 36a foiro (du div. st.) |
| 11. | Pula | Jugoslavio | jun. | „Esperanto k turismo“ |
| 12. | Poznan | Pollando | jun. | balonpoŝto „Katovice“ |
| 13. | Poznan | Pollando | jun. | balonpoŝto „Polonez“ |
| 14. | Podebrady | CSSR | jul. | 2a ŝakturniro (nigra/verda) |
| 15. | Opava | CSSR | jul. | kultura festivalo |
| 16. | Zaragoza | Hispanio | jul. | 28a Esp.-kgr |
| 17. | Gyula | Hungario | jul. | Somera Esp.-univ. |
| 18. | Malmö | Svedlando | jul. | 40a SAT-kgr |
| 19. | Miedzygorze | Pollando | sept. | 3a Esp.-ferio |
| 20. | Karl-Marx-Stadt | GDR | okt. | 80 jaroj de Esp. |
| 21. | Zielona Gora | Pollando | okt. | semajno de korespondado |
| 22. | Poznan | Pollando | okt. | sama |
| 23. | Olsztyn | Pollando | okt. | sama |
| 24. | Bialystok | Pollando | okt. | sama |
| 25. | Zielona Gora | Pollando | okt. | 80 jaroj de Esp. |
| 26. | Krakow | Pollando | okt. | sama |

**PRAGA 1968**

75 ekspozantoj el la Germana Demokratia Respubliko partoprenis en la konkuraj klasoj de la PRAGA 1968. Inter ili ankaŭ niaj Walter Täubrich el Leipzig kaj Rudolf Burmeister el Karl-Marx-Stadt. W. Täubrich ekzpozis objekton pri sporto kaj ricevis diplomon. Por sia bonega objekto „esperanto“ Rudolf Burmeister ricevis bronzan medalon. Al ambaú nian gratulon.

Videblaj estis ĉirkaŭ 1700 pm-ekspozaĵoj en 10 000 ekspoziciaj kadroj kun ĉirkaŭ 2 000 000 pm.

Dum la tagoj de la PRAGA 1968 okazis renkontiĝo de esperantistoj kiuj okupiĝas pri kolektado de esperanto-filatelaĵoj.

# Krucenigmo




**Horizontale:**

1) Inklino al persono aŭ ideo; 4) Spaco inter difinitaj limoj (tersurfaco); 8) Mezuraparato de premo (R); 9) Prepozicio; 10) Centra organo de la korpo; 13) Brunruĝa fera oksido (R); 16) Ne plu teni, ne plu konservi (R); 18) Malinklino (R); 20) Muzika sono; 21) Kaŭzi lacecon kaj malagrablecon pro trodaŭro, troripetiĝo aŭ troabundo (R).

**Vertikale:**

1) Mezurunuo de intenseco de elektra fluo (R); 2) Vasta etendaĵo de akvo (R); 3) Delikata agafo (R); 4) Intima proksimulo (R); 5) Prefikso; 6) Facile vaporiĝanta fluidaĵo (R); 7) Multvalora metalo (R); 11) Tre maldika disketo el nefermentinta panpasto (R); 12) Ĉiu kombinaĵo de oksigeno kun alia elemento (R); 14) Malnova mezurunuo de longo; 15) Konsistanta el tri partoj aŭ personoj; 17) Tre malgranda (skribu de malsupre supren); 18) Sufikso (gramatika kaj kemia); 19) Mallongigo por „oni nomas iun aŭ ion tiel“ R-nura radiko

H. R.

---

**Solvo de la krucenigmo el n-ro 22/23:**

**Horizontale:** 1. pipro; 4. Bebel; 8. raŭpo; 9. ratif; 12. torak 13. apro; 14. fosi: 15. trombon; 17. lan; 19. aerum; 21. ilo; 23. Rumanuj; 26. pulm; 28. ridu; 29. frezi; 30. pokal; 31. ringo; 32. neono 33. Vilao.

**Vertikale:** 1. pirat; 2. patro; 3. orf; 4. butonum; 5. epos; 6. boril; 7. lakon; 10. april; 11. ioma; 14. forum, 16. Berlino; 18. apuda; 20. maro; 21. infan; 22. opero; 24. nikel; 25. julio; 27. uzin; 30. pov.

Pro eraro estis uzata malĝusta klišo. La redakcio petas pardonon.



Foto: W. Hofmann

La partoprenintoj de la unua Esperanto-Seminario por kursgvidantoj de 17.—25. 4. 1968 en Oybin (GDR)

De maldekstre dekstren W. Bretschneider, R. Rabenalt, H. Wegner, J. Thormann, H. Jentsch, K. Heeg, D. Meyer, E. Plesar, J. Becker, H. Stengel, K. Urban, O. Gauk, D. Blanke; sidantaj F. Greif, prof-ino M. Krausowa (Pollando), E. Gruhle.

---

**TORUN** — Laŭ iniciato de Studenta Scienca Rondo de Esperantistoj en Torun (Pollando), ISAE starigis Informan Centron, kiu funkcios ĉe la universitato „Nikolao Kopernik“ en tiu urbo. La Centro planas okupiĝi pri informado kaj disvastigado de sciencaj materialoj en kaj pri Esperanto. La bazon de la informado donas la nun kolektata biblioteko, kiu inkluzivas la bibliotekon de ISAE kaj la librojn de la universitata biblioteko. Eksterlandaj fakuloj rajtos prunti erojn el la materialoj.

el „Informaĵoj“ de TEJO

---

**Solidarecon por la Vjetnama popolo luktanta pro sia libereco!**

La Esperanto-Grupo D r e s d e n kolektis po la solidara konto por Vjetnamio 200 germ. m. Laŭdinda kaj imitinda ekzemplo de solidarecaj esperantistoj.

**Esperanto-libroj estas por amikoj la plej bona donaco. Aĉetu vjetnamajn librojn esperantlingvajn ne nur pro memlegado, ili ĝojigas viajn korespondamikojn!**

## ESPERANTO-LIBRO HAVEBLA SENPAGE!

La Esperanto-Redakcio de la Pola Radio disponas pri kelkcento da ekzempleroj de la esperantlingva Libro „Polaj okcidentaj kaj nordaj teritorioj“, kiun oni sendas al ĉi unuopa interesiĝanto s e n p a g e. Por ricevi la eldonajon sufiĉas skribi poŝtkarton kun la peto kaj sendi ĝin al: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, VARSOVIO, Pollando. La adreso de la petanto estu skribita klare, nepre legeble! La E-instruistoj povas utiligi la aupre menciitan libron en la kursoj, kiel kompletigan legaĵon. Ni tamen akcentas, ke la eldonajon ni sendas nur al unuopuloj.

### Informoj Esperanto en radio

NOVAJ ONDOLONGOJ DE LA ESPERANTO-ELSENDOJ DE LA POLA RADIO

De la 16-a de aprilo 1968 Pola Radio elsendas sian ĉiutagan Esperanto-programon per la jenaj, iom ŝanĝitaj, ondolongoj: 25,09 m/= 11 955 kc./, 25,39 m/= 11 815 kc./, 31,01 m/= 9675 kc./, 31,35 m/= 9570 kc./, 31,45, m/= 9540 kc./, 41,99 m/= 7145 kc./, 42,11 m/= 7125 kc./.

La E-programoj de la Pola Radio estas disaŭdigataj ĉiutage de la 16.30 ĝis la 17.00 h. laŭ la mez-europa tempo. Ilustritan program-informilon pri la E-elsendoj oni povas havigi al si senpage, petante ĝin ĉe: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, VARSOVIO, Pollando.

### Jugoslavio

La fondiĝkunvenon de „Serbia Ligo por paco kaj egalrajteco inter popoloj“ ĉeestis ankaŭ Esperantistoj el la MEM-movado. La serbiaj Esperantistoj haves en la gvidantaro de la Ligo konstantan delegiton. Dum la kunveno estis sciigita, ke la jugoslavaj Esperantistoj estonte nun ankaŭ eldonos „PACO“.

### Italio

La Italaj Ŝtataj Fervojoj intencas uzi de nun ankaŭ la internacian lingvon Esperanto en sia horaro, aldonante ĝin al ŀa aliaj jam uzitaj lingvoj.

La membronombro de la Itala Esperanto-Federacio kreskis en la jaro 1967 je 21 %. De la novaliĝintaj personoj la plej granda parto estas gejunuloj.

### Sovetunio

La Soveta Akademio de Sciencoj kaj la apartaj Akademioj de Sciencoj de la diversaj sovetaj respublikoj faras nuntempe esplorojn pri la Internacia Lingvo. La esploroj okazas en speciala interlingvistika sekcio de la Instituto de Lingvistiko kaj en speciala sub-sekcio pri Esperanto.

Pli granda vortaro ol la konata vortaroRusa-Esperanto estas nuntempe preparata. En Tallinn estas preparata vortaro Estona - Esperanto. Similaj libroj estiĝos ankaŭ en aliaj sovetaj respublikoj.

### Hungario

En centra loko de Budapest malfermiĝis restoracio kaj bufedo kun la nomo „Esperanto“. Pluraj priservantoj de la restoracio parolas aŭ nun lernas la Internacian Lingvon, ĉar ili atendas esperantistajn gastojn el Budapest, el la tuta Hungario kaj aliaj landoj.

### ČSSR

Laŭ informacio de la nacia entrepreno Marina, Trenĉin, okazos en Oktobro 1968 en la sama urbo internacia konferenco pri teksaĵoj kaj teksindustrio, pri vestoj kaj modo, ĉe kiu la sola lingvo estos Esperanto.

# KORESPONDDEZIROJ

**Bulgario**

Bulgario — Velingrad Pučini 4, Boris Marinov, instruisto en forstista teknikumo deziras korespondi en Esperanto pri instruado kaj forsttaksaj problemoj.

Nikola Dimitrov Gjurnev, 25 jara — fraŭlo
Atanaska Dimitrova Gjurneva, 21 jara — fraŭlino
Georgi Dimitrov Gjurneva, 16 jara — lernanto

**Baldero, distr.: Blagoevgradski / Bulgario,** deziras korespondi kun la tuta mondo pri diversaj temoj: interesigas pri aŭtoj, sporto, gramofondiskoj, modo, medicino, moderna muzik, magnetofonoj, transistoroj, fotoj, filmoj, teatro, turismo, P. K. kaj P. M. Respondo certa.

**ČSSR**

19jährige Anfängerin wünscht Briefpartner aus Dresden oder der DDR — illustr. Bildkartentausch: Bozena Mikulková, Nadrazini 22, Sternberk okr. Olomouc, ČSSR.

Komencantoj deziras korespondi kun gejunuloj el la tuta mondo. Skribu al Ivo Mokroš, Závodní 153, Ostrava 4.

**Hungario**

Mi estas 30 jara hungara ĵurnalisto kaj laŭ mia profesio interesas min ĉiu flanko de la vivo: literaturo, scienco, sporto, arto ktp. Precipe kun ĝojo mi akceptus la respondon de ĵurnalista kolego: Cseri Sándor, Epreserdö u. 34, Budapest IX / Hungario.

**Pollando**

Mi estas 26-jara, instruisto kaj mi interesiĝas pri sporto, pedagogio, turismo, junularaj problemoj. Mi kolektas bildkartojn, poŝtmarkojn. Stefan Pawlik, Lipicse 45 pow. Sievadz/Pollando.

20-jara studento en la Stata Teknika Lernejo, interesiĝas pri muziko, fotoarto, filmarto, junularaj problemoj, ĉiutaga vivo en via lando, turismo. Mi kolektas bildkartojn, fotoalbumojn, prospektojn, diskojn kun distra muziko. diskojn kun dancmuziko: Johano Sikora, str. solskiego 22/8, Krakovo 2 / Pollando.

Mi estas 33-jara, oficisto kaj mi interesiĝas pri sporto kaj turismo. Mi kolektas poŝtmarkojn kaj bildkartojn: Boguslaw Sobol, Mokra Prawa 61a p-ta Skierniewice woj Lódzkie / Pollando.

**Maroko**

Marokano, 27 jarojn, deziras korespondi kun geamikoj de GDR kaj la tuta mondo pri poŝtmarkoj, poŝtkartoj, muziko, geografio kaj arto. Bayod Hoceine 35 Face Nouvelle Mosquee, Tabriquer-Sale (Maroko).

**Sovetunio**

Komencantino deziras korespondi kun gejunuloj: Trunova Ljudmilla, Str. Svobodnaja 30, Barnaul-16 / USSR.

Internacis Klubo, Palaco de Studentoj de ĤPI str. Puŝkinskaja 79 Ĥarkov, Ukrainio, kun internaciaj kluboj el ĉiuj landoj.

Ljudmila Isaĉenko (10-jara), str. 40 let Sov. Ukrainio 2a—67, Zaporojje 6, Ukrainio — kun ĉiuj landoj.

Rima Gutkina (studentino 22-jara) Čilanzar, kvartal 3, d. 16 kv. 18, Taŝkent 115, Uzbekio.

Instruista grupo dez. korespondi kaj interŝanĝi pri pedagogiaj kaj Esperanto-temoj:
Baĉkyte Rima (instr. la francan)
Šneraite Jadvyga (instr. la francan)
Urboniene Marija (instr. la rusan)
Jarmalyte Laima (muzikologo)
Karanauskaite (pionirgvidantino)
Meškauskas Povilas (agronomo)
Puodziunas Emilis (inĝeniero)
Lukoševičius Telesforas (teknika instruisto)
Adreso por ĉiuj JonišKelis, Janonio 21, Litovio.

**GDR**

Lernantino Kerstin Šlothauer, 5001 Erfurt-Möbisburg, Hauptstr. 16, 12-jara, deziras korespondi kun geamikoj el ĉiuj landoj kaj interŝanĝi bildkartojn.

Juna hungara instruisto (lingvoj) loĝanta en GDR dez. interŝanĝi pm (pri div. tem.) kaj korespondi kun geamikoj el la tuta mondo pri esperanto-eldonaĵoj kaj junularaj problemoj. Antal Bischhof. 252 Rostock, Gdansker Str. 22.

GDR-Adresŝanĝo
Bv. atenti mian novan adreson: D e t l e v B l a n k e, DDR-104-Berlin, Rheinsberger Straße 61.
Mi akceptas ĉiam ĉiujn ofertojn pri Esperanto-literaturo aĉetocele aŭ interŝanĝe.

**Anglio**

Juna komunisto-esperantisto deziras korespondi kun la tuta mondo pri politikaj temoj kaj esperanto-movado. Petro Johan Kop Wallis, Maldono, Essex 25 London-street.

(Zentraler Arbeitskreis Esperanto der DDR). Redaktion: 108 Berlin, Charlottenstraße 60. Fernruf: 22 59 91.
Verantwortl. Redakteur: Eugen Menger, Redaktionskommission: Otto Bäßler, Hans Eichhorn, Rudi Graetz, Rudolf Hahlbohm, Rainer Knapp, Erwin Schleusener, Willi Vildebrand. — Veröffentlicht unter der Lizenznummer 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckwerkstätte KG Glauchau